


Fekicajni somferojn!



Januaro – 2007 – N-ro 37-a
ASTURIO


ENHAVO

- 2...Nia regiono
- 3...Kulpa aŭ senkulpa
- 4...Mozaiko
- 5...Madrigalo
- 6...Constantino Suarez
- 7...Mesaĝoj
- 8-9 Juan Maria Acebal
- 10.La afero estas.....
- 11.La Kondolo
- 12.La Venkanto
- 13.La Indígena Kato
- 14.Dormu trankvile
- 15.Amuzaĵoj
- 16 Pensoj 3



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**

Donvolu: ne fagesu min!



La Montaró Aramo

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolás Muñiz

Prezidanto: Cezaro García

Sekretariino: M^a Luisa Menéndez

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: Císimo Rabanedo

Kasisto: Luis González

Bibliotekistino: M^a Isabel Murillo

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Valentín Pérez

Eva González

Celestino Majo

Tere Rodríguez

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILES Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depòsito legal:

Nº AS 1398 (1991)

N.I.F. G33677378

Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipo

NIA REGIONO

La Montaro ARAMO

La montaro Aramo estas en la centro de Asturio; ĝi apartenas al ĉi tiuj municipoj: je la orienta flanko, tiuj de Riosa, Morcín kaj L.lena [elp. Tĉena, pli malpli] (hispanlingve Lena); je la okcidenta: Quirós, Proaza kaj Santu Adrianu. Ĉi tiu montaro altiĝas sur la basenoj de la riveroj Trubia kaj Caudal [Kaŭdal']; je la riosa parto oni konstatas la rimarkindan nivel-diferencon inter la 320 m. de alteco de La Vega kaj la 1.773 m. de la monto Xistras [Ŝistras]. Ĝi estas la ĉefa rezervejo de vegetaro kaj monta faŭno en la norda centro-orienta sektoro de Asturio. Ĝi etendiĝas je preskaŭ 20 km. longe kaj 7 km. larĝe. Nuntempe ĝi estas konsiderata Protektata Pejzaĝo. La ĉefaj montoj estas La Gamonal, La Berriscal kaj El Gamoniteiru, kun 1.786 m. Estas fama la ascendejo L'Angliru, tre kruta, kiun plejmulto da hispanoj vide ekkonis okaze de la Bicikla Rondiĉo al Hispanio. Je la orienta parto, en municipo Riosa, troviĝas –en la loko Texeo– [Teŝeo] antikvaj kupraj minejoj. La nomo Aramo estas tiu de kelta praa dio de la Lugonoj (Lug: kelta dio de la lumo), centra tribo de la praaĵ asturoj.

La Redakcio

KULPA AŬ SENKULPA

Antikva legendo rakontas ke en la Mezepoko tre virtan homon oni kulpigis maljuste je murdi virinon.

Fakte, la vera aŭtoro estis tre influa persono de la regno, kaj pro tio de la unua momento oni atingis propekan kapron por kaŝi la kulpulon.

La homo estis portata al juĝado konite ke li havus malmultan aŭ nulan eblecon eskapi al la terura verdikto: ĵla pendigo! La juĝisto, ankaŭ implikita, zorgis, tamen, pri doni la veraspekton de justa juĝo; tial li diris al la akuzito:

“Konante vian reputacion de justa kaj pia homo de Dio, ni estas lasontaj en la manoj de Li vian destinon. Ni estas skribontaj en du apartaj papereroj la vortojn *kulpa* kaj *senkulpa*. Vi elektos kaj la mano de Dio estos, kiu decidos vian destinon”.


Certe la malbona funkciulo preparis du papererojn kun la sama skribaĵo “kulpa” kaj la kompatinda viktimo, ankoraŭ ne konante la detalojn, konsideris ke la proponata sistemo estis kaptilo. Ne estis eliro.

La juĝisto instigis la homon preni unu el la falditaj paperoj. La viro spiris profunde, restis en silento iujn sekundojn fermitokule kaj kiam la tribunalo komencis senpacienciĝi li malfermis la okulojn kaj kun stranga rideto prenis unu el la papereroj kaj portante ĝin al sia buŝo, glutis ĝin rapide.

Surprizitaj kaj indignitaj la ĉeestantoj riproĉis lin furioze: “Sed... Kion vi faris? Kaj nun... kiel ni konos la verdikton?”

-Ĝi estas tre simpla -respondis la homo-. La afero estas legi la papereron kiu restas, kaj ni konos kion tekstis tiu kiun mi glutis.

Kun grumblado kaj ĉagreno malbone simulata ili devis liberigi la akuziton kaj neniam ili ree ĝenis lin



Ludoviko

MOZAIKO

LA ESPERITA FOTONO

La luma energio de fotono liberigita en la centro de la suno, malfruas la bagatelon de du milionoj da jaroj por atingi la surfaco de la reĝa astro.



HALUCINANTAJ FRESKO-PENTRAĴOJ

Kelke da pentraĵoj faritaj de la paleolitikaj artistoj de la groto Pergeuset, en Lot Valley (Francio), estis efektivigitaj sub la efikoj de halucinantaj substancoj, laŭ oni deduktas de la analizoj de Michael Lorblachet

ŜTELISTOJ SEN SPURO

La infanaj ŝtelistoj lasas malpli da spuroj ol la adultoj, ĉar siaj fingroj eksudas pli da volataj komponaĵoj kiuj vaporizas rapide de la delikta sceno, laŭ la scienca polico de Tennessee (Usono) asertas.

FORTIKAJ MOLUSKOJ

La nutraĵo kiu havas pli da fero ne estas lentoj, sed kor-kontoj.

LA MUTILANTA INVENTAĴO

La unuaj kontraŭpersonaj minoj estis fabrikitaj de la ĉinaj en la jaro 1277.

RADIOAKTIVAJ GALEGOJ

La hispana provinco kiu havas la naturan radioaktivan nivelon pli alta, estas Pontevedra (en Galegio), kun meznombro de 17,06 mikroroentgenoj po horo. La malpli radioaktiva estas Murcio, kun 4,56 mikroroentgenoj po horo.

LA EVOLUO DE LA DOKTORO

La naturisto Charles Darwin komencis la medicinan karieron, sed li devis forlasi ĝin ĉar li vomemis en la kirurgiaj operacioj.

PEKAJ TAŬR-BATALOJ


Je la duono de la 16-a jarcento, la papo Pio V kondamnis la taŭro-festojn pere de ekskomuniko.

Daise

MADRIGALO

Se floroj havus harmonion
kaŝita inter siaj petaloj
kaj oni aŭdus iun tagon,
samkiel en revo,
dolĉegajn kaj flugilvahajn
notojn
kiel milda skizo
da tenereco, promesoj kaj
karesoj
kaj rumoroj de kisoj...
mi devus kredi je la miraklo
ke mi aŭdu la gajan
eĥon de via rido, glitante
inter aromoj kaj petaloj...

Verkis *Luis Menendez "LUMEN"*
Esperantigis *M^a Luisa Menendez*



CONSTANTINO SUÁREZ "ESPAÑOLITO" ("HISPANETO")

En Avilés, la 10an de septembro de 1890, naskiĝis Constantino Suárez Fernández, pli konata kiel ESPAÑOLITO (HISPANETO), pseŭdonimo kiun li uzis per unua fojo la jaron 1913 en artikolo publicita en la "Hispana Ĵurnalo", de Havano.

En 1906 li elmigris al Kubo, kie li loĝis ĝis 1921, travivinte diversajn oficojn, de helpisto ĝis vojaĝa komisiito de teksaĵa grandvendejo.

Sed Constantino Suárez kunportis en lia interno la semon de la akiritaj instruoj en liceoj de Oviedo kaj Ŝiŝono, kie li realigis studadon de bakalaŭro kaj komencis tiun de komercista profesoro.

Ĉi tiu elementa instruado kaj sia naturaj dotoj de observanto permesis al li disvolvi sian spritan kritikan saĝon kaj sian noblan deziregon de lukto kontraŭ maljusteco.

De tre junulo li komencis kunlabori en la samtempaj ĵurnaloj.

En 1908 aperis en la "Ĵurnalo de Avilés" siaj kronikoj kaj fabeloj. Poste, kun certa ofteco li publicis siajn kunlaboraĵojn en ĵurnaloj de Havano "Hispana Ĵurnalo" kaj "Mara Ĵurnalo" kaj en multaj aliaj de la ĉefa urboj de la hispana lingvo.

De sia reveno al Hispanio, enlokiĝita en Madrido, li disvolvis interesan literaturan aktivecon, kunlaborante kun diversaj ĵurnaloj, tiel de Madrido ("La Esfera" [La Sfero], "Heraldo [Heroldo]", "Nuevo Mundo" [Nova mondo])... kiel de Ameriko "El Progreso" [La progreso], "La Razón" [La Racio]... Same kiel de sia regiono, Asturio "El Noroeste" [La Nordokcidento], "La Gazeta" [La Gazeto], "Región" [Regiono], "La Voz de Avilés" [La Voĉo de Avilés]...

La 2an de junio de 1924 li edziĝis, en Avilés, kun la fraŭlino Dolores Suárez. Dum ĉi tiu jaro aperis en la librovendejaj montrofenestroj "Isabelina", kies agado pasas en Miracielo, facile rekonebla kiel Avilés.

En 1927 obtenis Constantino tri premiojn en aliaj literaturaj artkonkursoj: Per fabelo en la "Hispana Ĵurnalo" de Buenos Aires, per biografieto de la avilesa poligrafo Estanislao Sánchez Calvo; kaj per la rakonto "La Malgrasaj de la orgojlo", prezentita al la konkurso de "La Senpartio" en ĉeestantaro de aliaj 727 konkursantoj. Tra la jaroj 1930-31 li kunlaboris kun la respublikemaj partioj kaj ekde 1932 estis asignita al la Pedagogiaj Misiaj Mastraro, kie li okupis diversajn fakojn.

Constantino Suárez loĝis en Madrido la jarojn de la Enlanda Milito kaj li forpasis en la menciita ĉefurbo, la 4an de marto 1941.

Verkis: *Nicolas Muñiz Alonso*

Esperantigis: *Celestino*

MESAĜOJ

WILLIAM AULD FORLISIS NIN

La pasintan 11-an de septembro de 2006 mortis la fama skota esperantisto William Auld, kiu estis proponita kiel kandidato por la Nobel-premio pri literaturo ekde 1999.

Li estis redaktoro de "Esperanto en Skotlando" (1949-55), de "Esperanto" de UEA (1955-58, 1961-62), de "Monda Kulturo" (1962-63), de "Norda Prismo" (1968-1972), de "La brita esperantisto" (1973 ĝis hodiaŭ) kaj de "Fonto" (1980 ĝis hodiaŭ). Li estis vicprezidanto de UEA (1977-80) kaj prezidanto de la Akademio (1979-1983).

William Auld ekkonigis sin al internacia publiko en 1952, kiam publikiĝis la kolekto Kvaropo, pri kiu li kunlaboris kun John Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti. Tiu verko estis la komenco de la serio Stafeto', fondita de Juan Régulo Pérez en Kanarioj, kiu plenumis la mankon de la budapeŝta eldono Literatura Mondo.

Vera perdaĵo por la Esperantista Mondo kiun ni ĉiuj bedaŭras. Restas al ni lia riĉa verkaĵoj; inter ili:

- * Spiro de l' pasio (parto de la pluraŭtora poemaro "Kvaropo" 1952)
- * La infana raso (1956)
- * Unufingraj melodioj (1960)
- * Humoroj (1969)
- * Rimletoj (kun Marjorie Boulton, 1976)
- * El unu verda vivo (1978)
- * En barko senpilota (1987)
- * Unu el ni (1992)

(el Vikipedio kaj Unikoda Paĝo)

Rememoru ke vi povas

kontakti nin retpoŝtante ĉi tien:

esperanto@asturies.org

INTERRETO



Juan María Acebal ASTURA LITERATURO

Juan María Acebal naskiĝis en Oviedo la 8 de marto de 1815, kaj li mortis en la sama urbo la 11 de februaro de 1895. Tie, en la ĉefurbo de Asturio, li komencis sian studadon de Latina, Humanismaj kaj Filozofio kun la jezuitoj de Sankta Isidro, ĝis kiam en 1835 la hispana estraro elpelis tiujn religiulojn.

Ne fininte studadon, Acebal devas reveni en Oviedon, kie li laboris kun sia frato en diversaj metioj (fando-ateliero, pan-fornejo, minejo, presejo...); li ankaŭ elstaris kiel skulptisto kaj mekaniko-artisto.

Acebal estis tradiciema kaj religiema, simpatianta al la "karlisma" movado, kaj tial li devis ekziliĝi en Francio. Kvankam sia literatura produktado ne estis tiel riĉa kiel tiu de sia samtempuloj Teodoro Cuesta li estis konsiderita "princo de la bablaj poetoj" ("bablo" estas malmoderna nomo por la astura lingvo) ŝulde al sia lingva rigoro kaj beletra alteco.

Doktoro Atendanto

LA FONTO DE FASCURA

Subenirante la mont-pasejon
de la Sueve
de Antayo sub la montoflanko
kaj de Uruyán proksimete,
ĉar ŝtonon ĝi atingas,
elfluas de la roko
la plej bela fonto.

De la flanko de Sunlevo,
de tie je kie ĝi sprucas
kaj, kvankam iom krute,
ĝis akvofluo ĝi descendas,
ĝi krucas la vojeton
kiu iras en sian saman
enirejon.

Kiel softe ĝi kuras!
Kiel pure ŝprucas akvo!
Kiu kurvigo kaŭzas la vitro
kiu el la roko saltas!
Kaj kiel la bobeloj
bolas en la fonto
dum kuras en ĝi
tiu arĝenta kordono
disigitaj en multaj fadenoj,
de kiu unu de la alia eskapas
je iuj fendoj
de la rezervujo kiu ĝin ŝirmas
teksante kaj malteksante
je la kampo antaŭen ĝi glitas,
kaj lulas siajn foliojn
tuŝe de tiu akvo,
kvazaŭ ili volus
pagi al ĝi tiel la allogon,
la plantoj kaj la floroj
kiuj ekaperas surkampare.
Ĉu oni komputu ilian
senfinecon
je la solidiĝinta grundo?
Pli taŭgas kalkuli la herbaĵojn
kiuj ŝprucas en la fojno.
Ho, fonto de Fascura!
Kompare al vi,
kiom valoras tiu de Blandusia
aŭ iuj ajn ekzistantaj?

Vi donas verdecon al la
kampo,
freŝon mem al aero,
kaj balmon kaj kolorojn
de vi la floro atingas.
Vi spritigas la talenton
de tiu kun gracio
por fari bonan kantojn,
kontraŭe vi ne validas.
Tial la kapridetoj
ne iras malpuri vian akvon
enmetante en viaj rojoj
siajn ungojn kaj sian barbon.
Ankaŭ ne iras la pirokorado
kun plumoj de alia mirinda;
nur kriaĉojn ĝi dissendi,
eĉ pensante ke ĝi kantas;
nek de aliaj birdetoj
ne iras la araĉo,
ĉar ili konsideras propre
kriaĉi –ju pli ili klopodu;
kvazaŭ kanti estus
paroli ade, senpaŭze,
languzante konstante
dironte finfine nenion.

Juan Maria Acebal

Niaj Geamikoj

LA AFERO ESTAS TUTE ALIA

El la libro **RUZA PETRO**

Nasredin-hoĝo havis la kutimon iom dormi posttagmeze. Iun someran tagon li kuŝis sub la ombro de prunarbo. Al li venis Ruza Petro.

–Kio okazis? –la hoĝo demandis lin sen moviĝi.

–Antaŭ nelonge –Petro komencis rakonti maltrankviligitęsur la herbejo iu bovino per siaj kornoj elventrigis alian bovinon. La elventrigita bovino mortis.

–Trankviliĝu –Nasredin levis manon–. Atendu, ke mi bone komprenu. Vi diras, ke sur la herbejo iu bovino elventrigis alian bovinon per siaj kornoj...

–Kaj la elventrigita bovino mortis, hoĝo. Nun kio okazos? –Petro demandis.

–El la elventrigita bovino oni kuiros bongustan manĝaĵon. Kaj la alia bruto ne kulpas! –la hoĝo respondis trankvile.

–Ho, se tiel, mi vane timis! –Petro elspiris kun faciliĝo.

–Kial?

–Ĉar mia bovino elventrigis la vian!

–Ha-a-a, se tiel, atendu do, la afero estas tute alia! –Nasredin saltis kvazaŭ brulvundite.



Tradukis: *Koldo Pancev*

La Kondolo

A mis soledades voy,
De mis soledades vengo,
Porque por andar conmigo
Me bastan mis pensamientos.

[Al miaj solecoj mi iras,
De miaj solecoj mi venas.

Ĉar pro iri kun mi
Sufiĉas al mi miaj pensoj]

Lope de Vega

Kunsuferantoj, kantoj miaj junaj,
Azenoj laŭdas, nomas vin “virecaj”,
Nin, vin, min! Havas ni la “sangon ruĝan”!
Tion imagu nur, kunsuferantoj –
Nia virec’ nin levas el la svarmo;
Kiu supozintus tion?

Kunsuferantoj, vagis ni sub arbojn,
Aparte tedis nin stulteco vira.
Ni vagis pluki delikatajn pensojn,
Nia “fantastikon” nin ĝoje servis.
Nin ne furiozigis la virinoj,
ĉar ino adapteblas.

Kaj nun vi aŭdas, kion oni diras :
Oni komparas nin al tia ulo,
Kiu anoncas ĉie sian sekson
Kvazaŭ li ĵus ektrovis ĝin.
Ni lasu ĉi aferon, miaj kantoj,
reiru tion, kio nin koncernas.



Kunlaboranto Ezra Pound

LA VENKANTO

La venkanto estas parto de la solvo de problemo.
La malvenkanto estas parto de la problemo.
La venkanto ĉiam havas programon.
La malvenkanto ĉiam havas senkulpecon.
La venkanto diras: Lasu min tion fari.
La malvenkanto diras: Tio ne estas mia tasko.
La venkanto ĉiam trovas solvon por problemo.
La malvenkanto ĉiam trovas problemon por solvo.
La venkanto vidas rozon en ĉiu dorno.
La malvenkanto vidas plurajn dornojn apud rozo.
La venkanto diras: Tio certe malfacilos, sed eblos.
La malvenkanto diras: Tio eblos, sed certe tro malfacilos.

FAMAJ FRAZOJ

Bona ĵurnalo estas lando parolanta al si men.

Arthur Miller

La sekreto de la feliĉo ne estas fari kion oni volas, sed ami kion oni faras.

Leo Tolstojo

La kvalito neniam estas akcidento; ĝi ĉiam rezultas el inteligenta penado.

John Ruskin

La amo postulas, la amikeco fordonas.

Anonimo

Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝu.

Zamenhof

La vorto utilas ne por kaŝi la veron, sed por ĝin diri.

José Martí

Kolektis: Norberto Diaz Guevara

LA INDIĜENA KATO, LA STRIGO

KAJ LA AGLO (el la libro La Pratempo)

La mitaj estaĵoj de la Pratempo de la aborigenoj estis kaj bonaj kaj malbonaj, kiel nuntempaj homoj. El ĉiuj malbonuloj, la Indiĝena-Katviro, Kinigar, estis la plej timata, ĉar li mortigis por la pura ĝojo forpreni la vivon.

Dum Kinigar, apudestis, la virinoj kaj infanoj en siaj kamploĝejoj restis, kaj la viroj, se devigitaj forlasis ilin, la lancojn kaj lancĵetiloj ĉiam kunportis. Tamen, malgraŭ ĉi tiuj antaŭzorgoj, la frekventataj lokoj de la Indiĝena Katviro estis dise kovritaj per la kadavroj de viroj, virinoj kaj infanoj.

La buĉado tiel graviĝis, ke la triba estraro konsentis, ke Kinigar nepre pereu, ĉiariske. Malakceptinte multe da intrigoj, la viro decidis ŝtopi la elfluejojn de ĉiuj fontoj krom unu, tiel devigante Kinigar trinki ĉe ĉi tiu, kie la plej lertaj lancĵetistoj kaŝiĝos. La Strigoviro, Mopoke (pr. mopok), kaj la Agloviro, Wildu (pr. ŭildu) kiu elektiĝis por ĉi tiu tasko, marŝis al la fonto antaŭ la sunleviĝo kaj preparis embuskon. Tie pacience atendis ili dum longa, varma tago ĝis, malfrue posttagmeze, ili aŭdis Kinigar alproksimiĝi. La Indiĝena Katviro, zorge traserĉinte la ĉirkaŭan densejon por certigi, ke ne ĉeestas malamikoj, ĵus kaŭris por trinki kiam la atendintaj virioj lancis lin tiomloke, ke li mortis.

Tiun vesperon, la aborigenoj vidis ruĝan stelon malrapide leviĝi sur la ĉielon el la fonto, apud kiu la Indiĝena Katviro estis mortigita. Post kelkaj tagoj, nekonita katsimila besto, kovrita per blankaj makuloj, vidiĝis kuranta tra la herbo.

La ruĝa stelo de Betelĝuzo en la Konstelacio Oriono estas la spirito de Kinigar: la besteto, kiu ankoraŭ vivas en la boŝo estas lia transformita korpo; la blankaj makuloj sur sia felo estas la cikatroj de la lancvundoj je kiu li mortis.

Tradukita de *B. Allatt, Brisbano.*

DORMU TRANKVILE

Bonan matenon, kara amiko, ĉiam absorbata en la lernado de la lingvo tutmonda!

Vi demandas, kion ni faros ĉi-foje, ĉu ne? Ĉu vi vere deziras fari ion? Kial do? Ĉu ne plaĉas al vi resti farante nenion dum kelka tempo?

Nu, se vi volas labori, laboru. Se vi volas enkapigi al vi vortojn, enkapigu. Se vi volas relegi jam legitajn rakontojn, relegu. Mi ne malhelpos vin. Mi ne ĝenos vin. Mi ne volas vin senkuraĝigi.

Nur permesu, ke mi dormu trankvile. Mi decidis, ke ĉi tiu tago ne estos labortago por mi. Mi deklaras ĝin libertago.

Ĉu vere vi sentas vin tre malfeliĉa, se unu tago pasas kaj vi ne ricevis vian kutiman legaĵon en la nova lingvo? Kia stranga reago!

Bonvolu do pardonu min, se ĉi tiu legaĵo estas tro mallonga por via lego kaj lernsoifo. Mi kredas vin trovema, kaj fidus je via trovemo. Se vi volas labori, vi trovos laboron por fari. Kiu serĉas, tiu trovas. Serĉu do. Sed ne serĉu ĉe mi, ĉar mi ne deziras skribi nun. Mi deziras dormi, havigi al mi duan bonan matenmanĝon (mi jam manĝis unu, sed mi ŝategas matenmanĝojn!), iri promeni kun mia hundo tra la kamparo, ludi iom da muziko, fari ion ajn, kio plaĉos al mi, sed ne elpensi por vi malsaĝajn rakontojn, kiujn vi legos kvazaŭ soife pro nekomprenebla lernemo, kiu, ŝajne allasas al vi eĉ ne unu tagon da nenifaro (= neni(o)-faro, faro de nenio).

Laboru do kuraĝe, lernu multajn vortojn, legu longajn rakontojn, kaj lasu min pasigi tagon tute senzorgan.

Cetere, se vi volas fari kiel mi, ne hezitu. Mi atendas nenion de vi, ĉi-foje. Vian decidon –kreditu min– mi perfekte komprenos.

Mi dankas pro via komprenemo, kaj salutas vin plej sincere.

Ĝis la revido!

Claude Piron



Amitaĵoj



Golfa kaj genia rakonteto

Paro geedza praktikas golfon, kaj edzo diras:

--Karulino, ne batu tiom forte, ĉar povas esti akcidento.

Samtempe kiel li parolas, la edzino forte batas la pilkon, kaj ĝi preteriras vitran fenestron.

--Ho, ve, mi diris al vi!-- plorkrias la edzo. --Kion fari?, jes, ni iru pardonpeti la sinjoron de la domo...

Tien ili iras, kaj eniras domon kun pecoj da vitroj sur ĉien, kaj rompita botelo sur la planko. Edzo demandas:

--Pardonu, sinjoro, ke ni havis akcidenton golfan..., kompreneble, ni pagos.

La dommastro rigardas la paron ĝojplene, kaj diras:

--Ho, neniel, sinjoro mia! Vi sciu, ke mi estas genio, kaj via pilketo detruis mian botelan karceron dum mil jaroj. Do, mi povas doni tri dezirojn, kaj mi donos unu al vi, alian al via edzino, kaj mi havos la trian por mi mem.

--Ho!--, diris la edzo, --tiukaze, mi deziras milionon da eŭroj jare dum la cetera parto de mia vivo!

--Faritel!--, diras la genio. Venontfoje, kiam vi iros al via banko, mi trovos tie milionon da eŭroj krom tio, kion vi jam havis.

--Nu, mi ankaŭ deziras havi unu domon en ĉiu lando el la mondo--, diras la edzino.

--Koncesiite!-- la genio diras. --Sed nun mi ankaŭ diru mian deziron: dum pli ol mil jaroj, mi ne seksumis. Mia deziro estu, ke mi kuŝu kun via edzino nun ĉi tie.

La geedzoj rigardas unu la alian, kaj fine la edzo diras:

--Bone, konsiderante, ke ni havas domon en ĉiu lando en la mondo, kaj milionon da eŭroj jare, kial ne?

Sekve, la genio kaj la edzino iras aliĉambren, kaj ili havas genian seksumadon dum pli ol du horoj. Poste, kiam la ama afero jam malsupreniras, la genio demandas la edzinon:

--Kiom jaraĝa estas via edzo, kara?

Ŝi diras:

--Tridek kvin.

Kaj la genio konkludas genie:

--necesas esti idioto kredi pri genioj en tridekkvinjaraĝo!

PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)

Sendu al:

CISIMO R. SIMON

C/ La Magdalena n° 26 - 1° D

PENSOJ 3

Klopodu regi al tri aĵoj:

Al sia humoro, al sia lango kaj sia konduto.

Klopodu fortigi tri aĵojn:

Vian kuraĝon, vian bonvolon kaj vian afablecon al viaj proksimuloj.

Klopodu pri tri aĵoj por vi kaj la aliujoj:

Pri sano, ĝojan penson kaj bonaj amikoj.

Tri aĵojn evitu:

Malmolan koron, trosentemon kaj maldankemon.

Admiru tri aĵojn:

Naturon, infanojn kaj maljunajn homojn.

Donacu tri donacojn:

Almozon al malriĉuloj, konsolon al suferantaj kaj laŭdon al tiuj kiuj meritos tion.

El paĝoj de praga aŭgustinana ordeno

Kunlaborantino *Odette Scheidel*